


SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sennacieca revuo

2012-2013



Sennacieca revuo



Sennacieca revuo estas eldono de S.A.T.

Asocia sidejo de SAT

67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio
Telefono: + 33.9.50.71.01.97
satesperanto@free.fr
<http://satesperanto.org>
Poŝtkonto: SAT n°1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064 BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: sat-x

Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo
Sekretario: Tereza Sabatier
Kasistino: Franjo Lévêque
Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent, Brandon Sowers

Sennacieca revuo

Ĉefredaktanto: Robin' Beto
Enpaĝiganto: Andreo Hoaro kun Ĝilo Perez
Ceteraj redaktantoj: Andreo Hoaro, Nikolao Gudskov,
Jomo Ipfelkofer, Djémil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo,
Grazina Opulskiene, José María Salguero (Kani), Franciska
Toubale

Kontribuojn sendu elektronike al

sennaciulo.redaktejo@gmail.com
aŭ paperpoŝte al
SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent-Auriol, FR-75013
Paris, Francio

Ĉiujn demandojn pri financaj aferoj sendu al
franjo.leveque@gmail.com

Libromendojn sendu al
libroservo@sat-amikaro.org

Librajn eldonproponojn sendu al
pimskrab@yahoo.fr

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule-Ribot, FR-75017 Paris.

Aperas ĉiujare. Parution annuelle.

Le directeur de la publication : Guy Cavalier

Abonnement annuel — *Jara abono* : France 57 €

Autres pays — *Aliaj landoj* : peti la tarifon de nia peranto aŭ
de la SAT-centro.

Dépôt légal à la date de parution : n° CPPAP 0515 G 86567

Suppl. au n° 01-04 (1291-1294), janvier-avril 2013, de *Sennaciulo*

Enhavo

1	Prezento (Robin' Beto)	5
2	Kelkaj el la eksteresperantiaj inspirfontoj de SAT (Vinko Markovo)	7
3	Intervjuo de pastro Mark pri Lanti	15
4	La Romaoj: ĉu senteritoria nacio? (Xavier Rothéa)	21
5	Zapatista demokratio (Guillaume Goutte)	35
6	Nekonata defio de Joan Peiró i Belis: kunigi kooperativismon, kulturon kaj socian revolucion (Miguel Garau)	43
7	Marx, Reclus kaj Braudel: kien la homa evoluo? (Djémil Kessous)	61
8	Goya, universala pentristo (Antonio Marco Botella)	75

Prezento

Robin' Beto

Ĉi tiu numero de *Sennacieca Revuo* aperas malfrue pro tio ke dum longa tempo mankis taŭgaj artikoloj. Sed finfine ni sukcesis kolekti la necesan materialon por prezenti antaŭ viaj okuloj buntan kaj enhavoriĉan revuon.

Vi trovos en ĉi paĝoj diverstemajn artikolojn — ĉiu kun propraj kvalitoj — kiuj plenumas la celon de SR: publikigi ampleksajn klerigajn artikolojn. Ili ĉiuj estas aparte pripensigaj kaj malfermas antaŭ la legantaj satanoj gravajn inspirfontojn por nia agado. Mi kompreneble lasas vin malkovri tiujn riĉajn kontribuojn kaj sperti, kion ili estigos en viaj koroj kaj mensoj... scivoleme atendante la rezultojn en la SAT-a agado!

Samkiel mi jam tion esprimis aliloke, unu el la agadterenoj de SAT-anoj estas kontribui al la riĉeco de la revuoj, kiujn la Asocio publikigas. Kaj mi kaptas la okazon por kuraĝigi vin pri jam nuna konsidero al tio per kio vi povus kontribui al la venonta numero de *Sennacieca Revuo* aperonta en 2014 povu efektive aperi en 2014...

Mi deziras al vi instruplenan legadon kaj fruktodonan inspiron.



Kelkaj el la eksteresperantiaj inspirfontoj de SAT

Vinko Markovo

LA partoprenantoj de la SAT-kongreso en Jalto, kaj kelkaj aliaj kamaradoj en diversaj diskutlistoj esprimis la deziron pri pretigo de aktualigita versio de la Historio de SAT. La ĉi-suba artikolo celas kontribui al ĉi tiu klopodo, prezentante kelkajn informojn kaj pripensojn pri la medio, en kiu aktivis la ĉefaj fondintoj de SAT. En la pasintjara numero de *Sennacieca Revuo* k-do David Kelso brile reliefigis la fakton, ke Esperanto ne estas nur neŭtrala lingvo, sed ke ĝi portas propran kulturon, kiel ĉiuj aliaj lingvoj. Ja sendube la esperanto-movado havas propran, originalan kulturon. Sed ĝi kreiĝis el la konkreta medio, en kiu vivis la esperantistoj. Eĉ homo kiel Lanti, malgraŭ forta strebo al sennaciigo, estis la produkto de sia epoko. Ĉi tie mi provos iom priskribi la ĉirkaŭesperantian kuntekston, en kiu troviĝis la fondintoj de SAT, prezentante kelkajn figurojn el la franca laborista movado, kiuj ludis gravan rolon en debatoj malfaciligitaj de lingvaj kaj kulturaj problemoj.

1 La franca laborista movado ĉirkaŭ la Unua Mondmilito: sindikatismo kaj parlamentismo

Dum la jardeko antaŭ la eksplodo de la Unua Mondmilito, la franca laborista movado dividiĝis en du ĉefaj grupoj. Unuflanke la socialistoj, ĵus unuiĝintaj ekde 1905, ĉefe aktivis sur la politika tereno, interalie en la parlamento. Aliflanke la revoluciaj sindikatistoj agadis kadre de la Ĝenerala Konfederacio de Laboro (ĜKL, franclingve *CGT*), kaj pli koncentriĝis super demandoj ligitaj al la ĉiutaga klasbatalo. Ambaŭ grupoj estis sufiĉe diversenhavaj kaj disputis pri multaj temoj, interalie pri siaj interrilatoj. La sindikatistoj klopodis konservi sian memstarecon, dum iuj socialistoj regule provis fari el la ĜKL fakon de la partio. Ambaŭ organizoj utiligis plej revolucian retorikon, sed praktike iom post iom adaptiĝis al funkciado en la kadro de la kapitalismo. Dum la lastaj jaroj antaŭ la milito, kiun ĉiuj klare antaŭvidis, abundis la promesoj kontraŭstari al ĝi per diversaj rimedoj, interalie per ĝenerala striko. Sed konkrete, nenio estis antaŭvidita por efektiviĝi ĉi tiun kongresan decidon, kaj la naciisma milita ondo forbalais la konvinkojn de multaj aktivuloj. Iuj iĝis ŝovinistoj pro oportunismo, dum aliaj silentis pro timo. Ja la murdo de Ĵoreso (franclingve *Jean Jaurès*), sendube la plej influhava el la tiamaj

francaj socialistoj, estis atentigo, ke militkontraŭado estas danĝera afero. Krome estis publika sekreto, ke la registaro pretigis specialan kajeron (la t. n. „kajereto B“) kun la nomo de ĉiuj ĉefaj laboristaj aktivuloj arestendaj post la militdeklaro. Finfine arestoj ne okazis. Iuj kajeruloj eĉ eniris la registaron, dum multaj aliaj pravigis la militon „kontraŭ la germana imperiismo“ en socialismaj gazetoj. Kaj iuj gvidantoj, kiel Leono Ĵuhaŭso (franclingve *Léon Jouhaux*), sekretario de la ĜKL, ne nur „militis en la postfronto“, sed krome plene metis sin je la dispono de la registaraj manovroj, interalie por persvadi la italan registaron ekmiliti ĉe la franca flanko. Li plie ne hezitis utiligi siajn registarajn kontaktojn por premi aŭ subaĉeti iom tro kritikemajn aktivulojn, sendante ilin aŭ iliajn familianojn al la fronto, aŭ revenigante ilin hejmen antaŭtempe. Ironie, ĉi tiu ulo ricevis nobelpremion pri paco en 1951.

2 Monato kaj Rosmero, heroldoj de la militrifuza laborista movado

En tiu etoso, de naciisma furiozo konsekvencaj pacistoj kaj internaciistoj ne havis multajn agadeblecojn kaj rimedojn. La plej famaj estas la duopo, kiun konsistigis Petro Monato (franclingve *Pierre Monatte*) kaj Alfredo Rosmero (franclingve *Alfred Rosmer*). Monato estis jam ĉe la militeksplodo sufiĉe konata aktivulo en la laborista movado. Unue pure anarĥiista aktivulo, li poste turniĝis al agado ene de amassindikatoj. Li estis la ĉefa kontraŭanto al Eriko Malatesta dum la polemiko okaze de la anarĥi-komunista kongreso de 1907 en Amsterdamo, kie estis pridiskutataj la rilatoj inter anarĥiismo kaj sindikatismo. Du jarojn poste, Monato fondis la gazeton *La Laborista Vivo* (franclingve *La Vie ouvrière*), kies celojn li jene difinis:

La Laborista Vivo estos agad-revuo. Ĉu vere, agad-revuo? Jes ja, eĉ se tio povas ŝajni stranga. Ni deziras, ke ĝi utilu al aktivuloj okaze de iliaj bataloj, ke ĝi provizu ilin per materialo uzebla en la batalo kaj en la propagando, kaj ke tiel ilia agado pliampleksiĝu kaj pliintensiĝu. Ni deziras ke ĝi helpu al tiuj, kiuj ankoraŭ ne klare orientiĝas pri la nunaj politikaj kaj ekonomiaj demandoj, helpante iliajn esplorklopodojn.

Ni proponas nenian kateĥismon nek predikon. Ni eĉ ne kredas je la ĉiopov-eco de klerigado; ĉar ni opinias, ke la plej efika klerigado estas la agado. La kamaradoj, kiuj grupiĝis ĉirkaŭ *La Laborista Vivo* — kaj konsistigas ĝian kernon — ne ĉiuj samopinias. Kelkaj el ili membras en la socialista partio kaj aktivas tie; aliaj dediĉas sian tutan tempon kaj energion al la sindikata movado — ili estas la plimulto —; aliaj fine estas anarĥiistoj kaj tion tute ne kaŝas. Sed ni ĉiuj unuiĝas sur la tereno de la revolucia sindikatismo kaj asertas nin nete kontraŭparlamentismaj. Plie, ni ĉiuj opinias, ke movado estas des pli forta, ke ĝi enhavas klerajn aktivulojn, kiuj bone konas sian medion kaj la laborkondiĉojn en sia industria sektoro, kiuj scias pri la alilandaj revoluciaj movadoj, scias pri kiaj fortoj disponas la mastraj organizoj, kaj antaŭ ĉio estas arde entuziasmaj.

[Unua numero de *La Laborista Vivo*, citita el Chambelland, 1999.]

Jen sub iom alia formo ideoj pri sendogmeco, supertendenceco kaj kolektado de informoj sekve al agado en propra medio, kiuj reaperos kelkajn jarojn pli poste en la statuto de SAT.

Rosmero, komence ankaŭ individuista anarĥiisto, elektinta plumnomon el Ibsena romano, iĝis kunlaboranto de Monato iom pli poste, en la jaro 1910, sed rapide montriĝis aparte utila pro sia denaska kono de la angla lingvo. Li ja naskiĝis kaj kreskis en Usono, kaj unue vizitis la oficejon de Monato por helpi lin interkompreniĝi kun la usona revolucia sindikatisto Vilhelmo Z. Foster, kiu tiam vizitis Parizon. Dum la unuamondmilito venis al Parizo ankaŭ rusaj ekzilitoj, interalie Julio Martovo (ruslingve Юлий Мэртов), gvidanto de la kontraŭmilita alo de la menŝevista partio, Leono Trockio, kaj diversaj ontaj altranguloj de la sovetia registaro, kiuj tiam eldonis ĉiutagan ruslingvan socialistan gazeton. Tiuj aktivuloj rapide interkonatiĝis kun la parizaj kontraŭmilitaj aktivuloj, kaj de tiam regule kunvenis kune dum preskaŭ du jaroj. Tio lasis tempon por detalaj interŝanĝoj de spertoj kaj opinioj, kaj por personaj amikiĝoj, kvankam supozeble la urĝo de la ĉiutaga laboro kaj la lingvaj baroj ne ebligis plene eluzi ĉi tiujn eblecojn. Ja, eĉ inter plurlingvuloj kiel Rosmero kaj Trockio, la komunikado ne estis tute senproblema. Du jardekojn poste, komence de la tridekaj jaroj, Trockio ankoraŭ skribis ruse al Rosmero, kaj utiligis la tradukservon de sia sekretario por pretigi franclingvan version de siaj leteroj.

La prestiĝo de Monato kaj Rosmero multe rolis por instigi liberecanojn subteni la movadon por la Tria Internacio post la Oktobra Revolucio. Tio estis interalie



Monato (dekstre sidanta ĉe la podio) dum kunveno pri la funkciado de *La Laborista Vivo*, 1920



Rosmero (dua de maldekstre), sidanta apud Trockio (meze) kaj aliaj sovetiaj altranguloj,
ĉ. 1920

skribe agnoskita de Roberto Gihenefo (*Robert Guiheneuf*), tiam intima amiko de Lanti, kiu varbis lin al Esperanto, kaj al kiu li disponigos, sub la plumnomo Ivon, la bazan faktan materialon por *Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?* en 1935. Mi ĝis nun nenion legis el la plumo de Lanti mem pri la temo. La lastaj paragrafoj de *Fredo*, lia nefinita membiografio (legebla en *Vivo de Lanti*), ĝuste temas pri lia konvertiĝo de anarĥiismo al anarĥi-sindikatismo, sed li citas la filozofon Han Riner kiel ĉefan inspirofonton. Tamen la korespondado de Lanti kun Gihenefo indikas, ke la kontaktoj kun Monato estis sufiĉe oftaj. Interalie, Lanti provizis lin per leteroj de Gihenefo, kiuj jam meze de la dudekaj jaroj dokumentis la elreliĝon de la rusa revolucio. Kaj *La Proleta Revolucio*, alia gazeto fondita de Monato, Rosmero kaj kelkaj aliaj post ilia eksigo el la Franca Komunista Partio, publikigos en sia broŝurserio la franclingvan raporton enhavantan la spertojn de Ivon pri sia dekjara restado en Sovetio en 1936.

3 Rajmondo Lefevro kaj la kunlaboro kun intelektuloj

Alia homo, kiu kontribuis al la varbado de Gihenefo al komunismo, estis la verkisto Rajmondo Lefevro (franclingve *Raymond Lefebvre*). Gihenefo en siaj memoraĵoj raportas, ke lin impresis la „flamaj paroladoj“ de Lefevro. Sendube